

N° 198
avril
mai
juin
2022

LA INFORMILO

N° 198
aprilo
majo
junio
2022

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2022
Justa komunikado

esperanto
★ estas ★
mojosa!

ESPERANTO

FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €



Un "ZOOM" sur l'espéranto et les villes jumelées

Le thème principal du 89ème congrès italien d'espéranto qui se tiendra du 20 au 27 août à Brescia s'intitule: *La paix ne vient pas par hasard, les contacts entre habitants des villes jumelées jouent un rôle actif dans la construction d'un peuple européen.* Bien sûr, la pandémie n'a pas arrangé les choses et de nombreuses rencontres internationales n'ont pas pu avoir lieu, mais grâce à ZOOM, les rencontres virtuelles ont été nombreuses.

Ainsi le sujet des villes jumelées a pu être débattu lors d'une séance du 12.06.2022 en présence d'Alex KADAR, secrétaire général de UEA (Universala Esperanto-Asocio et responsable des contacts entre villes jumelées). Et il s'avère que la confrontation des différentes expériences dans ce domaine permet aux nouveaux volontaires de peaufiner leurs projets.

VERDEN kaj AMO-SEMINARIO EN GREZIJONO

La seminario okazis inter la 31-a de marto kaj la 5-a de aprilo 2022-a en la Esperanto-kastelo Greziljono. Ĝi estis la dua kunsido post *Parma* en Italio. La seminarion partoprenis du-deko da geesperantistoj kaj kelkaj pliaj per interreto.

La projekto VERDEN estas subvenciata de Eŭropa Unio kaj kunordigata de la Universala Esperanto-Asocio. En ĝi kunlaboras IFEF (Internacia Fervojistista Esperanto-Federacio) kaj BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo), kun la subteno de Parma Esperanto-Grupo kaj Flandra Esperanto-Ligo. Temas pri internacia kunlaboro pri daŭripovo kaj transporto. Ĝi ricevas subvencion de la nederlanda Erasmus-agentejo. En la projekto partoprenas la jenaj landoj: Belgio, Ĉeĥio, Francio, Italio, Nederlando. Francesco Maurelli, kunordigas la projekton nome



de UEA.

La renkonton en Greziljono iniciatis la prezidantino de IFEF Rodica Todor. La seminarion malfermis Stefan MacGill. Sara Spanò kaj Francesco Maurelli konigis al ni la programon Erasmus+ kaj la projekton VERDEN. Poste sekvis pluraj prelegoj: Jaroslav Matuška el Ĉeĥio parolis pri fakultatoj kaj projektoj, la juna studento Matěj Berka pri siaj spertoj en la projekto, Christine Brücker pri la danĝeroj de varmiĝo kaj Lars

Sözüer pri efiko de la trafiko al la klimato. Rodica Todor parolis pri la politiko de EU rilate al fervojo. Bert Schumann priskribis al



ni la verdan vojon sur iama fervojo ĉe Greziljono. Ladislav Hakl legis prelegon de Ladislav Kovář pri eksteraj kaj internaj kondiĉoj por daŭripova fervojtransporto. Boris Mandirola parolis pri "La Eŭropa Verda Pakto - daŭripova moviĝeblo". Franco

Bressanin prezentis plurajn filmetojn pri agrikulturo, akvomastumado, verdaj muroj kaj verdaĵoj eĉ en trajno-vagonoj. Vito Tornillo prezentis al ni la hibridajn trajnojn. Ambicia estas la projekto de Lars Sözüer pri retpaĝo por helpi al la planado de trajnaj vojaĝoj kun bicikloj.

Kadre de AMO 84 parolis Stefan MacGill pri fervojoj por daŭripovo. Laurent Vignaud instruis Esperanton al juna Matěj, kiu tre entuziasme mem eklernis Esperanton antaŭ kvar monatoj.



Dum libera tempo la partoprenantoj promenis en la ĉirkaŭaĵo kaj vizitis la urbon *Baugé* kaj ankaŭ ĝian malnovan parton kun spiral-tordita turo. Malgraŭ la ŝanĝiĝema vetero ni pasigis agrablajn tagojn inter esperantistoj.

Bongusta manĝo kontribuis al bona etoso. Bert Schumann tre bone prizorgis la ĉeestantojn.

Liba Gabalda

La 73-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO 6.-11. majo 2022

Post dujara paŭzo de realaj kongresoj, IFEF-okazigis kvaran fojon en Ĉeĥio kongreson en la bela urbo Beroun, kies emblemo estas urso. Apud rigardejo troviĝas du veraj ursoj. Dum la semajnfino en la ĉefa placo okazis fama potfarista foiro.

La kongreso estis eksterordinare bela kaj plen-sukcesa. Ĉiutage la esperantistoj ricevis surprizojn en formo de neatenditaj donacoj. Jam ĉe la alveno kaj registriĝo ĉiuj ricevis kvar boteletojn da diversaj likvoroj



produktitaj de la fama ĉeĥa produktanto "Becher". Ĝi estas amar-gusta specialaĵo ellaborita el pluraj plantoj kun kuracaj efikoj. Spic-kuketo kovrita per sukera E-flago, kiun disdonis al ni folklor-dancistoj "BARÁČNÍCI" post sia prezentado de kostumoj, ankaŭ surprizis nin. Vespere dum la interkona vespero sekvis bonvenigo kaj tosto. Ni estis ĝoje akceptitaj de la LKK-anoj kaj de la prezidanto de la ĉeĥa landa asocio Vladislav Vokoun.

Al la kongreso aliĝis 110 geesperantistoj el 15 landoj. La plej malproksimaj venis el Japanio kaj Koreio. Plej nombraj gesamideanoj venis el apuda Pollando. El Belgio venis grupeto de dek personoj por observi funkciadon de la evento, ĉar venontjare la IFEF-kongreso okazos en la belga urbo Antverpeno kun la postkongreso en Charleroi kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo.

Sabate la 7-an de majo okazis festa malfermo de la kongreso fare de Jaroslav Matuška en ĉeesto de la prezidanto de la ĉeĥa landa asocio FISAIC, Vladislav Vokoun kaj Blanka Havelková membro de la estraro de la



ĉeĥaj fervojoj. La kongreson salutis ankaŭ la prezidantino de la ĉeĥa E-asocio Libuše Hýblová kaj fine la prezidantino de IFEF, Rodica Todor, prezentis sian fest-paroladon. Ŝi kaj kelkaj aliaj pro siaj meritoj, ricevis belan kristalan lokomotiveton. Grupeto da infanoj de loka muzik-lernejo prezentis diversajn dancetojn. Post la paŭzo Pavla Dvořáková kantis kaj gitarludis. Sekvis salutoj de reprezentantoj de la partoprenantaj landoj. Rodica honorigis per diplomoj kelkajn merit-plenajn membrojn de IFEF kaj emfazis sindonan organizan laboron kaj subtenon de la kongreso al Anna Abelovská, al kiu ŝi transdonis diplomon de honora membreco. Poste, antaŭ la kongresejo de la "Grandhotelo Litava", ni komune fotiĝis. Posttagmeze kunsidis la Faka Komisiono kaj



okazis diversaj prelegoj kaj informoj pri aktualaĵoj. Vespere koncertis moravia grupo "NOPROBLEM" kaj poste nin sprite amuzis nigre vestitaj knaboj el la grupo "BLACK BUŘIŃOS".

Ĉiutage aperis bele ilustrita kongresa bulteno, entute sep numeroj. Kristin Tytgat gvidis E-kurson, kiun la ĉeestantoj tre aprezis. Petro Chrdle provizis vastan libroservon. Dum la kongreso okazis

diversaj prelegoj rilataj al fervojoj kaj fakaj kunsidoj. Dum la publika komitat-kunveno estis elektita nova estraro, fakte sen ŝanĝo. Espereble ili laboros same bone kiel ĝis nun. En loka preĝejo okazis orgena koncerto.

Antaŭ la promeno tra la urbo Beroun Petr Chrdle konigis al ni ĝian historion kaj parolis ankaŭ pri interesaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo. Posttagmeze la belgoj prezentis kaj donis kelkajn informojn pri la venontjara kongreso, kiu okazos en ilia lando kaj Magdaléna Feifičová (Fejfi) anoncis realigon de la sekva kongreso en Slovakio okazonta en la jaro 2024. Grandioza estis vespera bankedego kun vino kaj abundaj



koro. Bongustis tagmanĝo en apuda restoracio. Fakuloj de fervojo ekskursis al la centra reĝejo en Prago.

Impresa kaj bela estis la folkloro vespero, dum kiu gejunuloj prezentis kantojn kaj diversajn dancojn. Sekvis kostum-prezento de folklore vestitaj virinoj el diversaj regionoj. Vigla muziko kun amuzaj scenoj de la grupo "TŘEHUSK" riĉigis la programon.

Antaŭ la fermo de la kongreso Rodica dankis al ĉiuj organizantoj kaj partoprenantoj kaj belgaj samideanoj transprenis la flagon por la venonta

divers-specaj manĝaĵoj, legomoj, fruktoj, desertoj kaj, je la surprizo de ni ĉiuj antaŭ la fino alvenis grandega torto kun emblemo de IFEF. Tre agrable muzikis la grupo "JEDETO", konsistanta el muzikantoj de meza Bohemio. Ĉe la fino ne mankis dancado kaj la tombolo por ĉiuj, kiun prizorgis Anna Abelovská.

Agrabla estis la tuttaga ekskurso; unue al la kastelo Křivoklát, kie bonege ĉiĉeronis Pavla Dvořáková. Bonegan tagmanĝon ni havis ĉe kastela taverno.



Poste ni daŭrigis al la urbo Lužná u Rakovníka, kie ni vizitis fervoj-muzeon de diversaj

lokomotivoj kaj ankaŭ la specialan vagonon por la prezidento Masaryk. En alia speciala vagono ni povis refreŝiĝi per kafo kaj kuko. Antaŭ la forveturo ni kun Pavla kantis. Alia interesa ekskurso gvidis nin al la vitrofabriko "Rüchl" en Nižbor, kies emblemo estas cikonio. La vera paradizo en apuda ĝardeneto. Rememore ni ricevis vitro-memorajeton en formo de



kongreso. Denove, post kelkaj jaroj, ni ĝuis aparte agrablan kaj sukces-plenan kongreson en Ĉeĥio.

Liba Gabalda

IFEF-Kongreso: Postkongresaj tagoj (12.5. - 15.5. 2022)

Parto de la kongresanoj translokiĝis per trajno la 12-an de Majo el kongresa urbo *Beroun* al la urbo *Pardubice*. Tie komenciĝis nia postkongresa programo. Unue ni atingis hotelon *Labe* kaj post tagmanĝo ni ekiris al la centro de la urbo, kie oni konservas unikan historian konstrujaron, kiu konsistas el malnova urbo kaj kastelo, kiuj estis konstruitaj ĉefe en du stiloj – la gotika kaj la renesanca.

Dum la ekskurso ni vizitis ankaŭ la libro-centron “*U Vokolků*”. Tie ni vizitis malgrandajn ekspoziciojn dediĉitajn al *J.A. Komenský* (Komenio) kaj al unuaj ĉeflingvaj libroj. En la librocentro estis ankaŭ planita renkontiĝo kun esperantistoj el *Pardubice*.

La duan tagon ni ekveturis al la urbo *Litomyšl*, kiu apartenas al monda heredaĵo de UNESCO. Tre bela kastelo konstruita en la 16-a jarcento, urba placo de *Smetana* ĉirkaŭata de multaj historiaj domoj kun tute konservita arkaro sur ambaŭ flankoj faras el la urbo tre agrablan lokon. En la urbo ankaŭ naskiĝis la muzika komponisto *Bedřich Smetana*.

Post tagmanĝo ni daŭrigis nian veturadon al la urbo *Svitavy*, kie troviĝas Muzeo de Esperanto. Antaŭ ĝia vizito atendis nin vizito al la urbodomo, kie akceptis nin vic-urbestrino *Ditta Kukařová*. La urbo subtenadas la muzeon kaj la rilatoj inter la urbo kaj la muzeo estas tre bonaj. Ni trarigardis la urbodomon, trairis tra la urbocentro kaj atingis la muzeon, kie jam atendis nin sinjorino *Libuše Dvořáková* kun membroj de la E-klubo de *Svitavy*. Ŝi prezentis al ni prelegon pri la historio de la muzeo.

Dum veturado reen al *Pardubice* ni vizitis Herbejeton de rozoj. Nun tie estas memoraĵo pri ekzilantoj kaj enmigrado el nia lando.

14.5. nia ekskurso komenciĝis sur monteto *Chlum*, kie en 3.7.1866 okazis “batalo ĉe *Hradec Králové*” inter prusa kaj aŭstria-saksa armeoj. Prusoj tiam venkis. La batalo estis la dua plej granda batalo de la 19-a jarcento. Ĝis nun restis tie pli ol 480 memoraĵoj, tombejoj, ktp.

Pli plezura estis nia vizito al la Muzeo de sekuriga kaj telekomunika tekniko en *Hradec Králové*. Por ni fervojistoj, tre interesa loko, sed ankaŭ nefervojistoj havis eblecon vidi, kiel funkcias fervojo.

Poste ni veturis al “Tendaro de Komenio” en *Běleč*. En tiu ripoz-loko ni tagmanĝis kaj ripozis.

En najbara vilaĝo *Krňovice* troviĝas vilaĝa subĉiela muzeo, kiu proponis al ni eblecon vidi, kiel vivis niaj antaŭuloj antaŭ cent/ducent jaroj. La muzeo ankaŭ prezentas indulgo-plenan



naturamikan mastrumadon en la kamparo.

Nia lasta nia vojo gvidis nin al *Třebechovice*, kie estas videbla mondfama ligna, movebla betlehema sceno (krip-figuro), kiun admiras multe da vizitantoj. Ĝin konstruis tri ligno-skulptistoj *J. Probošt*, *J. Kapucián* kaj *J. Friml*. Ilia laboro iĝis mondfama. Do ankaŭ ni admiris ĝin. Poste ni revenis al *Pardubice*.

Ni esperas, ke la tuta ekskurso plaĉis al ĉiuj partoprenantoj, ke ili spertis novajn travivaĵojn.

L. Haki, 19.5. 2022

KONGRESO ESPERANTO-FRANCE 2022

de ĵaŭdo la 26-a ĝis dimanĉo la 29-a de majo 2022



En Trélissac proksime de Périgueux

Jam en 2021 estis planita tiu Interasocia Franca Kongreso de Esperanto en Perigordo. Sed pro la pandemio ĝi estis nuligita. Finfine ĉi-jare en 2022 la organizantoj kuraĝis refoje ĝin proponi en la urbeto Trélissac apud Périgueux. La nombro da partoprenantoj ja superis la esperojn kaj la kongreso ja estis vere sukcesa kun preskaŭ 150 partoprenantoj.

Ĝi okazis en la soci-kultura centro de Trélissac, proksime de la preĝejo. Ĉi tiu grandega konstruaĵo enhavas multajn salonojn, iuj tre grandaj, taŭgaj por kunvenoj de grandaj kaj malgrandaj grupoj.

La programo estis abunda. En tiu ĵaŭdo matene jam pluraj aliĝintoj estis alvenintaj.

En la posttagmezo jam komenciĝis Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj.

Estis ankaŭ planita ekskurso al Périgueux la mez-epoka kaj renesanca urbo.

La lasta bastiono de la mezepokaj ĉirkaŭ-remparoj tiam konsistis el 28 turoj kaj 12 pordoj. Ambrazuroj, kruc-formaj ark-embrazuroj, atestas pri milita arkitekturo de la urbo. La klarigoj estis faritaj en

la franca, de profesia ĉiĉerono, krome ĉiuj ricevis paperajn klarigojn en Esperanto.

Aparte interesa estis la katedralo Saint-Front kun pluraj kupoloj:

Monda kultura heredaĵo de la Homaro (1998) kiel grava etapo sur la vojo de Saint-Jacques-de-Compostelle (vojo de Vezelay). Unikaĵo pro sia orienta greka-kruca plano simila al tiu de Sankta Marko de Venicio, kies centro kaj branĉoj estas kovritaj per kupolo.

Restaŭrita en la 19a jarcento de Abadie, kiu uzis ĝin kiel modelon por la konstruo de la baziliko Sacré-Coeur en Montmartre (Parizo).

La sonorilo el la 12a jarcento disigas la malnovan latinan preĝejon de la baziliko, kies stilo similas la bizancan. Interne, belega baroka retablo, kaj la geedziĝo de Napoléon la Tria kun Eugénie de Montijo en la katedralo Notre-Dame de Parizo.



En la vespero estis proponita "Aperitivo de regionoj". Pluraj kongresanoj proponis specialaĵojn de sia regiono, aŭ trinkaĵojn aŭ manĝaĵojn. Regis tre amika kaj simpatia etoso.

La vespero finiĝis per prelego de C. Jègues-Wolkiewiez kun la temo "Lascaux kaj la ĉielo de la prahistorio". Laŭ la aŭtorino la lumo de la suno okaze la someraj kaj vintroj solticoj kaj de printempaj kaj aŭtunaj ekvinoksoj influis la tiamajn artistojn en siaj pentraĵoj.



Vendrede okazis iom spontana kantado de la Eŭropa Himno, laŭ la apuda teksto. En la Granda salono Katalin Kovács transdonis diplomojn al ekzamenintoj.

La duontaga ekskurso al la grotoj de Lascaux estis planita por vendrede posttagmeze. Ni atingis la lokon per aŭtobuso.

Tuj oni klarigis, ke la groto Lascaux 1 estas la originala groto, jam ne vizitebla por eviti difektiĝon. Ĝi estas rezervita al fakuloj. Tial ni povis viziti Lascaux 4, kiuj ja estas kopio de la originala je 90%. (Lascaux 2 reprezentis nur 45% de la tuto.)



Ĉe la enirejo estis bonaj klarigoj pri la klimato antaŭ 20 000 jaroj, ja multe pli malvarma, kvazaŭ de nuna Finnlando. La desegnaĵoj montris ĉefe ĉevalojn, prabovojn, nur escepte homojn kaj birdojn.

Ne eblis scii de kiom da homoj en kiom da tempo tiuj sur-rokaj pentraĵoj estis faritaj, ĉu dum jaroj aŭ jarcentoj. En la tiel nomata "ateliero" eblis kompreni kiel estis ellaboritaj la strukturoj imitantaj la originan groton. Tie eblis foti.

En la konferenco de C. kaj M. Redoulez pri la temo Brassens en Esperanto, eblis ĝue aŭdi plurajn kantojn de Brassens kantatajn de Jacques Yvars. Estis proponita la du-lingva libro kun la traduko al Esperanto de 66 kantoj de Brassens. Tamen pro manko de ricevitaj permesoj, la libro estas eldonita kun aldono "Tio-ĉi ne estas libro"



TIO-ĈI NE ESTAS LIBRO!

- Pro nepermeso de la internaciaj firmaoj Universal Music kaj Warner Chappell posedantoj de la aŭtor-raĵtoj
- Spita eldono de dokumento oficiale interna al la asocio Espéranto-Gironde
- Nekomerceble vendebla => nefiksita prezo
- Rezervita por kunkantado de La Kompanoj
- Alvoko de Espéranto-Gironde al subtenantoj
- Kontraŭ 15€ (+5€ sendokostoj)
=> kantaro Brasenso en Esperanto
IĜU MEM KOMPANO!



SPITE AL KOMERCIGO DE LA KULTURO, SENPREZE RICEVU ALTNIVELAN ELDONAĴON!

KONKLUDE

*Por forlasi strangan mondon, kuris mi
Droni en l' ocean' proksima pro humil'.*

*Ĝuste tie de la kompanoj flosis ŝip',
Mi kun fort' min alkroĉis al ĉi graplotip'*

*Kaj pro sorĉo regenenĝis tuta ver',
La espero ekĉesis esti sen esper'.*

Lastaj versoj de *La perditaj iluzioj*

Eŭropa Himno (esperanta versio proponita de Umberto Broccatelli)



Kantu kune amikaro,
ni la ĝojon festas nur;
nek rivero nek montaro
plu landlimoj estas nun ,

Ho Eŭropo, hejmo nia,
tro daŭradis la divid';
Nun brilegu belo via,
ĉiu estas via

Via flago kunfratigas
homojn post milita temp',
via leĝo nun kunigas
civitanojn en konsent'.

De l'Malnova Kontinento,
ĵus ekstaris la popol',
gvidas ĝin tre nova sento
kaj kuniga, forta vol'.



Sub la ŝildo de la juro,
ni vivados en konkord',
tio estas ĵuro:
unu land'kaj unu sort'.

Jen ekzemplo por la mondo,
jen direkto, jen la voj':
tuthomara granda rondo,
en la paco, en la ĝoj'

Tre interesa temo estis la prelego de Christian Grenier pri "La prahistorio en Scienc-fikcia literaturo".

La prelego estis en la franca, sur ekrano estis projekciita la teksto en Esperanto.

Aŭtoroj de scienc-fikcio regule informiĝas pri la veraj sciencaj malkovroj por verki romanon. Kelkfoje novaj malkovroj igas kadukaj iujn imagitajn vivojn sur la planedo Marso.



Komence de 1903 esperantista grupo estis kreita en Amiens, kie Jules Verne loĝis. Li entuziasme akceptis la honoran prezidantecon de tiu nova grupo kaj promesis al siaj amikoj verki romanon, en kiu li priskribus la meriton de Esperanto.

La verkitisto eklaboris, sed lia morto, 24an de marto 1905 (kvIn monatojn antaŭ la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-maro en Aŭgusto 1905), interrompis lian verkon kaj nur kvar ĉapitroj kaj la komenco de la kvina estis redakditaj, sub la titolo "Voyage d'étude". La rakonto temis pri ia aventuroj de kolonia misio en Afriko kaj unu el la temoj de tiu romano devintus esti

Esperanto. Estas interese noti kelkajn parolojn, kiujn la aŭtoro dirigas al unu el la personoj de la rakonto: *"Estas rimarkinde, unue, ke Esperanto estas simpla, fleksebla, belsona lingvo, kiu taŭgas same por eleganta prozo kiel por harmoniaj versoj. Ĝi kapablas esprimi ĉiujn pensojn kaj eĉ la plej fajnajn sentojn de la animo. Krome, pro siaj elementoj, ĝi estas la ideala internacia lingvo. La principa ideo, kiuj gvidis ĝian kreadon estas la elekto de radikoj proporcie al ilia internacieco kvazaŭ per universala voĉdonado"*

Lia filo, Michel Verne, finis kaj publikigis tiun romanon en 1914 sub la titolo "L'étonnante aventure de la mission Barsac" sed bedaŭrinde nuligante ĉian rilaton al Esperanto!

Duncan Charters prezidanto de UEA planis partopreni la kongreson, sed pro virusa kontakto, li ne rajtis vojaĝi. Tial lia ĉeesto estis nur virtuala pere de zoom. Li unue prelegis pri la temo "Kiel prepari la vojon por argumenti pri Esperanto al iaj kontraŭ-argumentoj". Li ĉefe celis tre diplomatan aliron al la temo: "Argumentanto, disputanto ne estas malamiko".

En alia kunveno Duncan Charters prezentis la ŝanĝojn deciditajn de la komitato de UEA por resanigi la financojn de UEA. Jam estas la dua sinsekva pozitiva jaro por UEA, post pli ol 20 deficitaj jaroj. La konstruaĵo de la centra oficejo estas vendata. Ĝia riparado estintus ege kosta. Sed la sidejo restos en Roterdamo. La libroservo troviĝos en Slovakio kaj la biblioteko en Vieno.

Jen Jomo vikle kantis por la distra vespero. Parto de la publiko dancis laŭ tiuj viglaj ritmoj.





Aleks Kadar, ĝenerala sekretario de UEA, skizis la situacion kaj planojn de UEA. Unu el la planoj estas sukcesigi la venontan UK-on en Montrealo kaj la 75-an IKU-sesion. Krome tra la mondo la 8-an Afrikan Kongreson en Senegalio, la 10-an Oceanian Kongreson en Bussano en Koreio.



Tamen: Pluraj dokumentoj, aliĝiloj, programoj estis nur en la franca. Eĉ iuj prelegoj estis aŭdeblaj nur en la franca. Aliaj prokrastitaj aŭ eĉ nuligitaj. Iuj eksterlandanoj spertis iom da problemoj.

Jen finiĝis tiu kongreso. Ĉiuj deĵorantoj de la loka teamo iris al la scenejo kaj ricevis varmajn aplaŭdojn kaj gratulojn pro tiu sukcesa kaj bone organizita kongreso. Poste ĉiuj estis invitataj al lasta amika aperitivo. **Multajn dankojn al la organizantoj.**

Skribas Ŝoel Fontaine el Strasburgo: Impresoj el la ĉi-jara nacia kongreso en Trelisako Perigordo.

Por iu, kiu ek-esperantiĝis antaŭ tri jaroj, unuafoje partopreni nacian kunvenon estas granda paŝo por la integriĝo en la Esperanto-movado. La evento estis profesie organizata de la loka grupo de esperantistoj. La loko en Trelisako, apud Perigordo estis agrabla kaj tute taŭga.

Estis agrable diskuti kun tiom da esperantistoj el ĉiuj partoj de Francio, eĉ el aliaj eŭropaj landoj.

La partopreno de Katalin, Sylvain, Duncan (rete) kaj pluraj aliaj elstaraj membroj de la komunumo estis ege interesa por la novulo, kiu mi estas.



La strasburga delegacio: Bruno, la Prezidanto de E-o France, Laure kaj Ŝoel.

Tiu kunveno estis ankaŭ okazo por malkovri belegan regionon, kiun mi tute ne konis. Kia riĉeco: desegnaĵoj de prahomoj, restaĵoj de la romia imperio, multaj konstruaĵoj de la renesanca periodo, mezepokaj kaj novaj kasteloj de ĉiuj epokoj, mirindaj grotoj La listo estas senfina. La vizitoj kun lertaj gvidistoj kaj la aktivaĵoj proponitaj faris la kunvenon ege interesa kaj tre amika. Ni ankaŭ ĝuis ĝojan etoson kiam ni kune kantis kanzonojn de Brassens en Esperanto aŭ kiam ni aŭskultis Jomo, kies viglaga muziko dancigis la publikon.


Vivi dekojn da jaroj en Francio sen viziti Perigordon estas hontinda afero ... Bonŝance post longa internacia kariero en scienco por kio la angla lingvo estas deviga, mi malkovris kaj eklernis Esperanton kaj dank'al tio ankaŭ malkovris tiun mirindan parton de Francio kaj ĝiajn viglajn kaj interesajn loĝantojn. Perigordo estas vizitenda. Mi estas



dankema al la tiea klubo kiu preparis kaj tiel lerte funkciigis la kunvenon. Nun mi estas tute konvinkata pri tio, ke Francio estas grava parto de la tiel nomata "Esperantujo" kaj antaŭĝojas la venontajn eventojn. Por la preparado de la kongreso en Strasburgo por 2024, mi esperas, ke ni faros tiel bone kiel niaj amikoj el Perigordo.

Ŝoel

La loka teamo el Perigordo.

Espéranto France-Est http://esperanto.france.est.free.fr.				Orient-Franca Esperanto-Asocio.	
La Informilo		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO		Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO	
Rédaction: Redaktoro:		Edmond Ludwig kaj André Grossmann		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto <i>Président</i> kaj Libro servo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag18@sfr.fr
Aliaj komitatanoj <i>Assesseurs</i>	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36 06 76 54 77 78	liliber54@yahoo.fr
	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello54@gmail.com
	S-ro Gilbert STAMMBACH	06 87 40 01 16	gilbert.stammbach@gmail.com
	S-ro Joël FONTAINE	07 82 43 02 48	joel.fontaine@jfon.fr
S-ro Bruno HENRY		esperanto.bhenry@laposte.net	

Abono al La Informilo →	18 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <i>Abonnement à La Informilo</i>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← <i>Paiement par virement au compte</i>
Per internacia ĝiro →	IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Zoom al ĝemelaj urboj	15. Gaja semajnfino en septembro	ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i>
2. Grezijono Amo-seminario	16. Raportoj pri nia ĜMK	
3. IFEF-kongreso 2022 en Ĉeĥio	17. Raportoj pri nia ĜMK	
4. IFEF-kongreso 2022 en Ĉeĥio	18. Rakonto Fraŭlino Pudoro	
5. IFEF-post-kongreso 2022	19. Rakonto Fraŭlino Pudoro	
6. Kongreso en Trélissac	20. Katalunio + Staĝoj en Grezijono	
7. Kongreso en Trélissac	21. Enigmo + humuraĵoj	
8. Kongreso en Trélissac	22. Bona observanto de TAKE	
9. Kongreso en Trélissac	23. Bona observanto de TAKE	
10. Komitato kaj enhavo-listo	24. Métabief aŭgusto 2022	
11. Angulo de la nova prezidanto	25. Métabief aŭgusto 2022	
12. Angulo de la nova prezidanto	26. Fabeloj La ansero + Primolo	
13. Daŭra aktualeco	27. Mielo en Colmar	
14. Gaja semajnfino en septembro	28. Nia foto-paĝo	

Estimataj gesamideanoj,

ANGULO DE LA NOVA PREZIDANTO



Dum la lasta membrokunveno en Villers lès Nancy, la komitatanoj elektis min kiel novan prezidanton de Esperanto France Est. Mi kore dankas pro tiu fido-montro. Tiu elekto tamen ne rezultas el longa kampanjo mia por esti kalifo anstataŭ la kalifo sed el akcepto transpreni taskon, kiun Edmond Ludwig de pluraj jaroj aspiris forlasi por koncentriĝi je aliaj esperantistaj agadoj. Mia ĵusa emeritiĝo forprenis la ekskuzon por rifuzi la postenon, Do mi akceptis ĝin, ĝis kiam pli freŝdata emeritulo ne povos ĝin rifuzi aŭ se mirakle iu ajn nepre deziras ĝin!

Mi pardonpetas pro iom pli longa angulo ol kutime kaj eĉ tuj dankas tiujn, kiuj legos ĝin ĝisfine.

Mi unue deziras danki al Edmond, kiu dum jardekoj aktivegas por la disvolviĝo de Esperanto kaj krom multaj aliaj esperantistaj agadoj (gvidado de kurso, tradukado, verkado de artikoloj, senĉesa partopreno en “efe informas”. . .) plenumis la oficon de prezidanto de EFE de 1983 ĝis 1996 kaj denove de 2009 ĝis 2022. Ni ĉiuj permense aplaŭdu lin! Dankon Edmond!

Nun kelkaj rimarkoj pri Esperanto ĝenerale, kaj regione.

De pli ol du jaroj nia movado frontis malfavoran venton, kiel neniam antaŭe krom dum la dummondmilitoj, Pro la kovida pandemio, ĝi povis nur viveti. Tamen, dank'al modernaj komunikiloj, la kontaktoj daŭris, sed lokaj kursoj ne povis regule okazi. Kaj plej granda parto de la eventoj-de regionaj aranĝoj ĝis internaciaj kongresoj- devis esti nuligitaj, Tio multe frustris la organizantojn, malpermesis la kontaktojn, forigis interesatojn kaj eĉ foje endanĝerigis la asociajn financojn.

Ĉu finfine, la pandemio vaporiĝos? Ne certe! Plie alvenis novaj danĝeroj kun reapero de milito en Eŭropo. Tio ĉi plej grave povos konduki al kompleta katastrofo, minimume al malfaciligado de kontaktoj kun niaj rusaj samideanoj,

En tiu periodo de “malgrasaj bovinoj”, ĉu prepariĝas aliaj kataklismoj: revekiĝo de dormantaj vulkanoj, tertremoj, cunamoj, sekecegoj, inundegoj, falo de meteoritoj? Eble! . . . Kaj eble ne! La observado de la pasinto montras, ke nia movado ĉiam sukcesis feniksi. Plie, ĉu ne estas devo por vivantulo ĉiam fronti la obstaklojn, cele pluvivigi kaj progresigi sian idealon?

Pri la Esperanto movado, krom la nunaj esceptaj eventoj, montriĝas, miaopinie, ke ĝi spertas pli daŭrajn malfacilaĵojn: maljuniĝo de la membroj pro manko de junaj novuloj, malfortiĝo de multaj grupoj, monda subpremigo fare de la angla kiel helplingvo, eĉ apero de pli kaj pli elektronikaj efikaj tradukiloj. Tio levigas timigajn, sed ankaŭ interesajn kaj verŝajne solveblajn demandojn.

Loke, mi konstatas, post jam kvardekjara sperto pri la regiona esperanta vivo, evoluon grandparte similan al tiu en la mondo aŭ almenaŭ en Eŭropo:

- la teknika progreso en la telekomunikaj teknikoj multe influis nian lokan vivon:
 - . pozitive ĉar ĝi ebligis pli facilajn, rapidajn kaj malpli kostajn rilatojn inter la lokaj membroj kaj kompreneble kun eksterlandanoj. Ĝi ankaŭ permesis la kreadon de tre utilaj retejoj, kie eblas trovi informojn pri eventoj, revuoj, kaj ĝeneralajn informojn pri la movado kaj ties kulturo.
 - . iom negative, ĉar ĝi parte malkreskigis la alvenon de novaj membroj en la asociojn, kiuj tamen ludas gravan rolon en la vivo de la lingvo

Antaŭ kelkaj jardekoj, aniĝis al Esperanto France Est novaj esperantistoj, kiuj eklernis pere de lokaj parolaj kursoj aŭ pere de nia poŝta perkoresponda kurso. Nun alvenas al la grupoj, krom kelkaj allogitaj pere de iu prezentobudo, ĉefe novuloj, kiuj eklernis pere de interreto, Sed kiom da perretaj eklernintoj neniam provas kontakti lokajn grupojn kaj forlasos la esperanto-mondon?

- sur pli regiona tereno, mi konstatas, ke antaŭe estis multe da lokaj grupoj, ofte viglaj, en ĉiuj departementoj, kaj iliaj membroj ofte aktive partoprenis en la regiona asocio, Nun bedaŭrinde pluraj grupoj malvigligiĝis, eĉ malaperis. Plie, ŝajnas -sed la pandemio certe influis tie- ke pluraj grupoj iom izoligiĝis kaj ke ties membroj eble ne plu juĝas utile partopreni en la regiona agado.

Do jen ĝenerala demando: ĉu Esperanto France-Est ankoraŭ utilas? Kaj ideaj demandoj:

- ĉu papera Informilo, en tempo de interreto, ankoraŭ necesas?
- ĉu ni daŭre havu libroservon, kiam nun estas facile per la reto konsulti katalogon, mendi kaj pagi?
- ĉu ankoraŭ organizi semajnfinajn staĝojn, kiam eblas lerni per la reto?
- ĉu regiona asocio utilas, se lokaj grupoj memstare viglas?

Mi tre ŝatus, ke, dum la venontaj monatoj, ni debatu pri tiuj demandoj.

Ĝis tiam, mi tuj donos mian vidpunkton pri la utileco de nia regiona asocio.

Certe, ĝi ne devus esti ia hierarkia strukturo, kiu direktus aŭ kontrolus la agadon de la lokaj grupoj.

Ĝia celo, laŭ mi estu:

- permesi al ĉiuj unuopuloj kaj grupanoj de la regiono sin retrovi kelkfoje dum la jaro, okaze de iu staĝo, ĝenerala kunveno aŭ iu alia por firmigi personajn ligojn, ĝui komunajn manĝojn kaj kulturajn aranĝojn, turismi, interkonigi proprajn spertojn, imagi projektojn
- organizi komune kun niaj eksterlandaj najbaroj renkontojn, kie ni povas vivigi nian komunan lingvon (ni jam kreis daŭrajn rilatojn kun Bavelo, ni ankaŭ kreskigu niajn rilatojn kun belgaj, luksemburgaj, sarlandaj, palatinaj kaj svisaj samideanoj)
- helpi la lokajn grupojn en siaj projektoj, per reklamado, kunorganizado kaj eĉ (ĝis iu grado) monhelpo
- instigi al komuna kalendaro de la lokaj eventoj, por eviti koliziojn kaj permesi alternan partoprenon de grupo al grupo.
- trovi kiel renkontigi tradician kaj modernan esperanto-mondojn. Rifuzi modernigon estus pereiga, vivi nur en virtuala reta mondo malligis el la realeco. Ni prenu la plej bonan el la du mondoj por krei novan ankoraŭ pli bonan!

Tiam, ja EFE ŝajnus al mi utila, Ĝi plumarŝu sur du piedoj: reta Informilo jes, sed kun ebleco ricevi paperan version; perretaj kursoj, jes, sed kun ebleco plifortigi sian lernadon okaze de semajnfinaj staĝoj, kaj tiel renkonti aliajn lernantojn; perrete esplori librorojn, jes sed konservante la eblecon foliumi paperajn librojn en la libroservo; vivigi sian lokan grupon, jes, sed daŭre konservi kontaktojn kun la najbaroj!

Promesite: la venanta angulo estos multe pli mallonga!

Jean-Luc Thibias



El nia libroservo

Informoj

- ⇒ sen E° semajnfinoj, (preskaŭ) neniuj vendoj!
 - ⇒ sen vendoj, neniuj enkasigoj!
 - ⇒ sen enkasigoj, ne-ebleco aĉeti novajn librojn!
 - ⇒ la libroservo donacas al siaj fidelaj klientoj tiun blankan paĝon!
 - ⇒ restas la ebleco legi la pasintajn Informilojn aŭ konsulti nian katalogon en la retejo de Esperanto France Est,
- Ĝis baldaŭ!

Jean-Luc Thibias

libroservo.efe@laposte.net



Daŭra aktualeco!

Leganto de la regiona gazeto DNA (Les Dernières Nouvelles d'Alsace) interese kaj trafe informis la legantojn per la suba letero de Victor HUGO "Alvoko al la rusa armeo en 1863*": Tiu leganto aldonis: "Se oni anstataŭigas en tiu ĉi teksto la grasliterajn terminojn "Pollando, pola, Varsovio, Peterburgo, caro kaj XIX-a jarcento" per "Ukrainio, ukraina, Kievo, Moskvo, Putin kaj XXI-a jarcento", eblus peti de Victor HUGO, ke li ree sendu sian leteron al la rusa armeo! Konstatu mem!

Rusaj soldatoj, reĝu homoj. Ĉi gloro estas aktuale proponata al vi, ekkaptu ĝin. Dum tio ankoraŭ eblas, aŭskultu:

*Se vi daŭrigas ĉi sovaĝan militon; se vi, oficiroj, kiuj estas noblaj koroj, sed kiun kaprico povas malgradigi kaj ĵeti en Siberion; se vi soldatoj, hieraŭaj servutuloj, hodiaŭaj sklavoĵoj, perforte forŝiritaj de viaj patrinetoj, de viaj fianĉinoj, de viaj familioj, regatoj subknutaj, malbone traktataj, malbone nutrataj, kondamnitaj dum longa tempo kaj por nedefinita daŭro al milita servado, pli severa en Rusio ol punlaboro alilande; se vi, kiuj estas viktimoj, vi vin engaĝas kontraŭ la viktimoj; se je la sankta momento, kiam la respektinda **Pollando** ekstaras, je la lastebla momento, kiam vi povas elekti inter **Peterburgo**, kie regas la tirano kaj **Varsovio**, kie regas la libereco; se en tiu decidiga konflikto, vi ignoras vian devon, vian unikan devon, la fratecon; se vi komune agas kontraŭ la **poloj** kune kun la **caro**, t.e. ilia ekzekutisto kaj la via; se, subprematoj, vi de la subpremado lernis nur la subtenon de la subpremanto; se vian malfeliĉon vi transformas al honto; se vi, kiuj tenas ĉemane la spadon, vi disponigas al la despotismo, peza kaj malforta monstro, kiu vin ĉiujn dispecigas, vi rusojn same kiel la **polojn**, vian forton blindan kaj dupan; se anstataŭ vin turni kaj alfronti la buĉiston de la nacioj, vi malbrave subpremezas, per la supereco kaj la multnombreco de la armiloj, tiujn heroajn, malesperigitajn popolanojn postulantajn unuarangan rajton, la rajton je patrolando; se meze de la **deknaŭa** jarcento, vi finmurdas **Pollandon**, se vi tion faras, sciu tion, viroj de la rusa armeo, (...) vi naskos la abomenon de la civilizita mondo! La krimoj de la perforto estas kaj restas krimoj; la publika hororo estas puno.*

*Rusaj soldatoj, serĉu inspiron ĉe la **poloj**, ne batalu kontraŭ ili. Tio, kion vi trovas antaŭ vi en **Pollando**, tio ne estas la malamiko, tio estas ekzemplo.*

Victor HUGO, Hauteville-House, la 11-an de februaro 1863

** La pola insurekcio de 1863 kontraŭ la rusa imperio estis ribelo por la sendependeco de Pollando en la tiama pola teritorio, kiun tiam okupis Rusio.*

Mencio de Esperanto en la nacia bulteno de ADEAF (Association pour le Développement de l'Enseignement de l'Allemand en France)

La asocio de instruistoj pri la germana lingvo en Francio (ADEAF) aperigas en sia bulteno de marto 2022 vastan studon de la lingvistoj Alain kaj Louis-Jean CALVET. La studo informas pri la disvastigo de la lingvoj tra la mondo, pri lingva diverseco en Europo, pri lingvoj kaj dungeblecoj, ktp. Aperas ankaŭ rubriko pri la tempo necesa por lerni fremdan lingvon. Kaj tie aperas eltiraĵo el la studo de François GRIN, profesoro ĉe la Universitato de Ĝenevo, kiu citas informojn de la Kibernetika Instituto pri Pedagogio de Paderborn jam konata de ni esperantistoj. Legeblas p. 67 de la bulteno: La instituto komparis la studodaŭron necesan de pluraj grupoj de francparolantaj gelernantoj kun la bakalaŭra nivelo por atingi "standardan" kompareblan nivelon en kvar diversaj lingvoj: Esperanto, angla, germana, itala. La rezultoj jenas: 2000 horoj por la germana, 1500 horoj por la angla, 1000 horoj por la itala kaj ... 150 horoj por la lernado de Esperanto.

Jen informoj jam konataj de ni, sed ne nepre de la legantoj de la bulteno.

E.L.

La perdinto (Fatos Kongoli) Ars Libri – Lublin – 2021

Kiel atestanto de la politika reĝimo en Albanio dum la regno de Enver Hoxa nia samideano Bardhyl SELIMI jam konatas ĉe Espéranto France-Est kaj inter la legantoj de MONATO. Duan* romanon de lia iama kunstudento pri matematiko Fatos Kongoli li tradukis kun nia pola samideano Tomaš Chmielik, same konata en nia asocio.

Certe vi memoras pri la bildoj de ŝipoj plenplenaj de fuĝantoj, kiuj forlasis Albanion post la falo de la diktatoro. Tian ŝipon la ĉefrolulo de la romano disiĝas lastminute de elmigranta amiko kaj forlasas la ŝipon. Li decidis resti en Albanio.

Reveninte al la polvokovrita urbeto apud la cement-fabriko, li revidas ĉe la tombejo ulon, kiu antaŭ kvardek jaroj ludis centran tragikan rolon en lia vivo de lernanto, de enamiĝinta adoleskulo, de studento kaj de politika persekutito. Vi malkovros ekzemplojn de la malfacila vivo de simplaj homoj kaj de privilegiaj loĝantoj de la luksa getoo en Tirana, kies privilegia situacio ofte subite ĉesis, ĉar

E.L.

** Jam aperis Hunda haŭto.*

"Gaja semajnfino"

9a - 11a septembro 2022 Sonnenmatte, Erpfingen, Germanio



Lerni Esperanton estas plezuro. Ĉefe en gaja komuneco de internacia lern-semajnfino. Kaj principe en la aparta etoso de „Gaja Semajnfino“ kun siaj multaj aktivajtoj.

Ĉi-jare jam la tranoktado estas io speciala: Ni loĝos en apartaj dometoj de ferio-vilaĝo: "Sonnenmatte". Ĉiu **dometo** havas 3 aŭ 4 dormĉambrojn, grandan loĝ-ĉambron kaj kuirejon kaj povas gastigi ĝis sep personoj.

Nia ferio-vilaĝo „Sonnenmatte“ situas proksime de Reutlingen sur la Ŝvaba Ĵuraso, kaj la apuda ĉirkaŭaĵo jam prezentas multajn interesajn kaj vidindajn aferojn. Eblecoj abundas, tial ni fine nur surloke decidis, kion realigi. Ni povos elekti inter jenaj:

- **Kastelo Lichtenstein** (ne konfuzu kun la similnoma eta ŝtato Liechtenstein en la Alpoj). Komence de la 19a jarcento la Ŝvaba verkisto Wilhelm Hauff verkis romanon „Lichtenstein“, kiu vaste konatiĝis kaj famiĝis. Ĝia ĉefa scenejo estas ĝuste la kastelo. Sed tiu-tempe ĝi tute ne ekzistis. Troviĝis nur ruino de mezepoka sam-noma burgo. Ĉar la romano fariĝis granda sukceso, iu grafo decidis restarigi kastelon sur la tereno kaj en la jaro 1840 konstruigis la kastelon laŭ sia imago pri mez-epokaj burgoj. Do, Lichtenstein fariĝis same "fabela" kiel tridek jarojn poste la pli granda kaj pli fama bavara Neuschwanstein. En la germana kaj en la franca vikipedio troviĝas paĝo pri la kastelo (DE, FR).



- **Ĉeval-bredejo Marbach** (oficiale „Haupt- und Landgestüt Marbach“)

Ĝi fondiĝis en 1491, do estas la plej malnova ankoraŭ ekzistanta ĉeval-bredejo de Germanio. Hodiaŭ ĝi estas unu el nur kvar en la tuta lando. Aparte grava tie estas la breda konservado de ĉevalaj rasoj, kiuj alie formortus, ekzemple la



Ĉevalinoj de la araba raso

"malvarm-sangaj" rasoj **Schwarzwälder Kaltblut** kaj **Alt-Württemberger**.

La sango-temperaturo de tiuj rasoj estas same alta kiel ĉe "varm-sangaj" rasoj, sed la malvarmuloj estas pli pezaj kaj fortaj, kaj havas pli trankvilan temperamenton, tial oni uzas ilin por pezaj laboroj en la agrikulturo, dum la varmuloj ĉefe servas por rajdado.)

Por vizitantoj de la bredejo aparte allogas la ĉeval-paradoj, kaj ĉiukaze la ĉiutagaj gvidadoj tra la bieno. Vikipediaj paĝoj en la germana kaj franca: DE, FR.

- **Gut-ŝtonaj kavernoj** abundas en Ŝvaba Ĵuraso. Do proksime de Sonnenmatte situas du, kiuj estas konataj jam de longe kaj komforte alireblaj por esploremluloj, tiel ni elektos inter
 - Bärenhöhle (DE) (Ursa kavernoj)
 - Nebelhöhle (DE) (Nebula kavernoj)
- **Freizeitpark „Traumland“** (Amuziĝa parko, revolando') - tuj apud la urso kavernoj.
- **Osterei-Museum** (Muzeo pri ornamitaj paskaj ovo) ... kvankam septembro ne estas la plej taŭga monato por viziti ĝin;-)

Kiel kutime dum Gajaj Semajnfinoj ni multe agados kaj vizitos kelkajn el tiuj *allogaĵoj*. La elekto ne estos tute facila;-)

Ferio-vilaĝo Sonnenmatte

Sonnenmatte 51 D-72820 Sonnenbühl-Erpfingen

Tel 049 7128 92 99-0

info@die-sonnenmatte.de

En Ŝvaba Ĵuraso, unu el la plej belaj mez-altaj montaroj de Eŭropo, sur alteco de 800 m, situas vilaĝo



Sonnenbühl-Erpfingen, renoma pro sia "bona aero". Kaj en tiu vilaĝo troviĝas la ferio-vilaĝo Sonnenmatte kun 55 ferio-dometoj. Sonnenmatte estas ŝatata kiel elirpunkto por migremuloj, biciklemuloj kaj ĝenerale ekskursemuloj.

La ferio-dometoj taŭgegas por familioj, por memzorgantoj aŭ por homoj, kiuj prizorgas sin per manĝaĵoj el la ferio-vilaĝa restoracio. La granda tereno de la vilaĝeto lasas aŭtojn ekstere. Kaj ĝi provizas nin per aktivejoj por futbalo, plaĝ-flugpilkadumi, ludi globludon (Boule), infan-ludejojn, krad-rostejojn, fajrejojn ...

Alveturo

Alveturo per privata aŭto:

El Stuttgart tra Reutlingen kaj Pfullingen al Sonnenbühl-Erpfingen. La koordinatoj de Sonnenmatte estas: 48.51614 N, 9.186348 O.

Alveturo per PPPT (Publika Proksima Person-Transporto):

La plej proksima granda trajn-stacio estas **Reutlingen** (en distanco de 20 km. Cetere, Reutlingen mem valoras viziton). Guglo-mapoj ne proponas ian alveturadon per trajnoj, busoj aŭ similaj, do ni trovis vere idilian lokon por nia Gaja semajnfino, ĉu ne?! ;-)
Do, por ĉiuj, kiuj ne alveturas per propra aŭto, ni klopodas organizi "Esperanto-Bonvolu **"nepre menci"** en via aliĝilo, ke vi bezonas Eo-taksion.

Programo de la Gaja Semajnfino 2022

9. - 11. 09. 2022 en la feria vilaĝo "Sonnenmatte" en Empfingen

La nomo de la evento jam signifas la programon: Ni ne lernas en kursoj, sed dum komunaj spertoj en la regiono.

Horaro

!!! Ĉiu evento kaj eventero dependas de la aktuala situacio de la pandemio !!!

Vendredo, 9a septembro

17:00 - 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado
18:00 bonvenigo kaj interparolado pri la pliaj dezirataj programeroj
vespermanĝo
poste: libera kunveno

Sabato, 10a septembro

matenmanĝo (verŝajne memfarita en la domo)
poste vizito al unu aŭ du de la vidindaĵoj (priskribita en la paĝo *Invito*)
manĝoj ie survoje

Dimanĉo, 11a septembro

matenmanĝo (verŝajne memfarita en la domo)
poste: Forlasi la domojn kaj viziti aliajn vidindaĵojn

Aliĝo al la Gaja Semajnfino 2022

Eblas aliĝi elektronike per la formularo sur tiu ĉi paĝo aŭ ĉe Inge Simon (aŭ retroŝte aŭ telefone: +49.7361.360615).

Kiu pripensas partopreni sed ne certas, bonvolu kontakti Inge. (Por ke ni povu pli bone plani.)

Kostoj

La aliĝkotizo estas 10 €. Por gejunuloj ĝis maks. 29-jaraĝaj: 0 €.

La kostoj por la tranoktadoj en la feria vilaĝo estas **65 €** por ambaŭ noktoj, kaj en unu-lita ĉambro **85€** (se disponeblas).

Surloke aldoniĝos laŭkaze la kostoj por manĝadoj kaj por biletoj dum la ekskursoj.

Kastelo *Lichtenstein* (4€)

Ĉevalbredejo *Marbach* (gvidao 6€)

Kaverno aŭ *Bärenhöhle* aŭ *Nebelhöhle* (5€)

Amuziĝa parko *Traumland* (19€)

La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago sur nia konto:

BAVELO

IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22

BIC: SOLADES1VSS (Sparkasse
Schwarzwald-Baar)

Bonvolu ĝiri laŭeble frue. Dankon!

Nia kasisto pretas peradi viajn pagojn, se necesas bonvolu interkonsenti kun li.

Aliĝilo al Gaja Semajnfino 2022		
Nomoj kaj adreso		
Telefono		
Ret-poŝtadreso		
Ĉambro-kategorio	<input type="checkbox"/>	ne bezonata
	<input type="checkbox"/>	1-lita ĉambro
	<input type="checkbox"/>	2-lita ĉambro
Tranoktado	<input type="radio"/>	ne bezonata
	<input type="radio"/>	ambaŭ noktoj
	<input type="radio"/>	vendrede/sabate
	<input type="radio"/>	sabate/dimanĉe
Aldonaj rimarkoj		vegetarano, vegano, atentigo pri nutraĵaler
Mi venas per tajno aŭ buso	<input type="checkbox"/>	kaj mi petas kunveturadon

Ĝenerala membro-kunveno de Orientfranca Esperanto-Federacio la 15an de Majo en Le Domaine de l'Asnée en Villers-les-Nancy

La prezidanto, Edmond Ludwig, bonvenigis la partoprenantojn per varmaj vortoj kaj emfazis omaĝon al Claude Nourmont kaj al François-Xavier Gilbert, kiuj forpasis antaŭ nelonge.

La reprezentantoj de lokaj grupoj informis pri kelkaj agadoj dum 2021:

La strasburga grupo kunvenas unufoje monate kaj proponas unufoje semajne kursojn.

Ili ankaŭ kreis kelkajn esperantajn filmetojn disponeblajn ĉe Youtube, kiel ekzemple la kristnaska festivalo.

Du piknikoj estis organizitaj en parko apud la landlimo kun Germanio. La venonta okazos la 25an de junio.

Por ebligi diskutadon kun eksterlandanoj, la klubanoj foje kunvenas, rete, kun la klubo de Tübingen, ĝemel-urbo de Strasbourg.

La 25an de majo, en la Maison des Associations, tuttaga renkontiĝo por komencantoj ebligis malkovri Esperanton.

Paralele, la klubo de Strasburgo jam komencas

prepari la organizadon de la nacia kongreso de 2024.

La **nancia grupo** organizis viziton en Graufthal, konata pro la enrokaj domoj. Ili ankaŭ varbadis pri Esperanto ĉe la loka radio "Caraïbe", per tri kursetoj kaj okupiĝis pri tradukado de ludoj en Esperanton.

La **grupo de Mulhouse** kunvenis unufoje monate okaze de la "verda fadeno", ĉiam la lastan lundon de la monato, aŭ en Rixheim, aŭ en Saint-Louis kun la bazelaj esperantistoj. André Grossmann ankaŭ plueldonis la lokan revuon SRK (Sudrejna Kuriero) samtempe por Mulhouse kaj Bazelo.

La **grupo de Thionville** kunvenis, rete aŭ fizike, kaj reklamis en loka gazeto.

Detala raporto pri la agado de ĉiuj lokaj grupoj aperis en LA INFORMILO;

Poste, la kunsidantoj sekvis la anoncitajn punktojn de la tagordo.

- **La raporto pri la Ĝenerala Membro-Kunveno de 2021** estis unuanime aprobita same kiel la **estraraporto**.

- **Financa raporto de la jaro 2021:** Post kontrolo de niaj reviziantoj, S-ino Henriette Ludwig kaj S-ro Bertrand Wick, nia kasisto André Grossmann prezentis al ni la jaran financon raporton, kiu estis unuanime aprobita. Nia financa situacio estas daŭre bona sed, jar-post-jare, la enhavo de nia kaso ŝrumpas. Ĉiuj dokumentoj kaj raportoj estas disponeblaj laŭ peto. La raporto estis unuanime aprobita, samtempe kiel la raporto pri la libroservo. La proponita buĝeto por 2022 ricevis nenian ŝanĝon kaj estis unuanime akceptita.

- **Renovigo de la komitato:**

Triono de la komitatanoj estis reelektota: **Micheline Colnot, Edmond Ludwig, Michel Basso**. **2 novaj samideanoj iĝis kandidatoj: Joël Fontaine kaj Bruno Henry**.

Ĉiuj kvin kandidatoj estis unuanime reelektitaj.



Jam lastjare, Edmond Ludwig menciis sian deziron, ne plu rekandidatiĝi kiel prezidanto. Jean-Luc Thibias akceptis tiun novan rolon.

La partoprenantoj plej kore dankis al Edmond Ludwig pro lia longdaŭra agado en tiu funkcio kaj gratulis al Jean-Luc Thibias pro lia nova rolo en nia movado.

Edmond Ludwig estas nun la sekretario kaj André Grossmann restas kasisto kaj zorganto pri La Informilo kaj la retejoj kaj dissendolistoj. Jean-Luc Thibias daŭre respondecas pri la libroservo.

Ĉiuj estis unanime elektitaj de la membroj de la komitato.

Aliaj temoj pritrakitaj:

André Grossmann, kiu daŭre kaj kompetente okupiĝas pri La Informilo, anoncis, ke la nombro de abonantoj iom malkreskas. Ĉar la send-kostoj estas sufiĉe altaj (573 € por 2021) ni diskutadis pri la indeco sendi nian revuon (laŭ papera versio) al la abonantoj.

Post diskuto ni decidis, ke ĉiuj membroj ricevu mesaĝon por senpage elŝuti la pdf-version de La Informilo. La papera versio estu sendata al ĉiuj pagintaj abonantoj. La prezo de la papera versio estos 19 € por 2023 kaj 20 € eŭroj por 2024. La kotizo, **kiu do inkuzivos la retan version**, estos daŭre proponata je 7 eŭroj.

La 2an de julio okazos amika tago en Sélestat. Rendezuo je la 10-a antaŭ la stacidomo. Samideanoj, kiuj venos trajne, estos ŝoforataj al parkejo rande de la urbo. Pro nescio pri la evoluo de la pandemio, pikniko estas proponata. La programo estos anoncata per la retlisto EFE-informas.

La informoj pri la venonta staĝo en Germanio, organizota de Bavelo, aperos en la venonta Informilo.

Post kuna manĝo Edmond Ludwig prezentis kelkajn novajn librojn kaj Brian Moon prelegis pri la Akademio de Esperanto.

La tago finiĝis per vizito al la botanika ĝardeno de Nancy. Belis la vetero kaj bongustis la manĝo en la belaspekta restoracio en Domaine de l'Asnée.

Gilbert Stambach, la 18an de majo 2022

Sekva al la decidoj de la komitato jen la kotizoj kaj abonoj, por la venontaj jaroj.

Krome la membroj ne-abonantoj ricevos mesaĝon por elŝuti la pdf-version de La Informilo

Jaroj	2022	2023	2024
Abono por la papera versio:	18 eŭroj	19 eŭroj	20 eŭroj
Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj

Dankoj al edzinoj de aktivaj esperantistoj

Kiam mi ankoraŭ membris en la komitato de Espéranto-France, nia samideanino Renée TRIOLLE atentigis la kunvenintojn, ke Esperanto ankaŭ nepre danku al la edzinoj de niaj aktivuloj.

Tion mi ĉi tie deziras fari, unue ĝenerale al ĉiuj edzinoj, subtenantinoj de aktivuloj esperantistaj, eĉ se ili ne parolas Esperanton, ĉar plej ofte estas ili, kiuj zorgas pri manĝoj kaj pretigo de ĉambroj dum la ĉeesto de gastoj.

Pli persone mi ŝatus danki al Henriette, mia edzino, kiu – dum pluraj jardekoj – akceptis kaj daŭre akceptas gastojn en nia hejmo. Ĉar ŝi kutimas zorge noti, kiu gastis kaj kiajn menuojn ŝi proponis, facilis trovi inter la centoj da gastoj kelkajn dekojn da esperantistoj el 18 landoj. Internacia etoso ĉetable: kio pli esperantista?

Intertempe, ekde sia pensiĝo, Henriette sufiĉe regas Esperanton kaj dum kongresoj ŝi ebligis al mi partopreni samtempe 2 prelegojn: dum mi ĉeestas unu, ŝi ĉeestas alian interesan kaj poste raportas al mi. Ŝi nun ankaŭ estas nemalhavebla helpantino en reviziado de tradukoj el Esperanto, el/al la franca kaj kaj el/al la germana. Pro ĉio tio: dankon Henriette! E.L.

Fraŭlina pudoro similas al oro

Verko premiita en la Belartaj Konkursoj Dua premio de prozo, 1954

de Gerald C. Jervis

S-ino Dotita Sengarna impetis trans la straton, mirakle evitante la trafikon. Kamiona ŝoforo samtempe sakris kaj rapide bremsis, sed la insulto svenis sur lia lango. Li kun ŝato rigardis la gracian figuron de la pekintino, jen sveltan, jen rondan, kaj ĉiam ĝustaloke, ĝis la blondaj bukloj, la nekredeble blondaj bukloj, fordancis en la pordon. Poste, responde al senpacienca signalo de aŭto malantaŭe, li premis per piedo kaj manipulis per mano. La kamiono muĝis, tremegis, kaj ruliĝis for, portante kun si direktiston kun dolĉe melankolia koro. La aluminiuj kaseroloj en la ŝarĝujo klakadis kaj knaris funebtron al efemera revo.

Malantaŭ la sceneja pordo de la Teatro Gaja Muelilo, la pordisto levis sian grizan kapon kaj rigardis tra la giĉeto, dum la blondaj bukloj preterfulmis. Li senemocie rearanĝis la kurban pipon inter la dentoj, kaj lia spirito denove trempis sin en gazeta sport-artikolo.

Du longaj kalkanumoj kastanjetis sur la sentapiŝa ŝtono de la ŝtuparo per muziko klare kolera. F-ino Sengarna spiralis ĉiam supren kaj ĉiam maldekstren.

Ŝi taktakis laŭ koridoro. Atinginte pordon, ŝi per unu movo ĝin frapetis kaj malfermis, kaj sin enĵetis.

"Hola, Zaza!" ŝi eligis en okupita tono.

Roza Lipopar ne ĉesis kritike ekzameni en la spegulo la efekton de la ŝminko, kiun ŝi ĵus aplikis al la vizaĝo.

- "Hola Doti!" ŝi bonhumoris. "Ĉu via amato vin ĵetis? Kial vi demandas? Via mieno ne ŝajnas tre somera.

- Ha! Mi ne dubas. Hu, la fimensa, la ruza, nazo-flua bubaĉo. . .

- Ja temas pri via amato.

- Amato? Ne! Ami tiun rateton? Mi parolas pri la filo ĉe mia loĝejo".

Jam preta en karnavaleca formo de la kostumo de usona bovistino, F-ino Lipopar iom premis sin al la muro de la ĉambreto. En la malvasta spaco tiel disponigita, ŝia kamaradino komencis demeti la platon, la jakon, la jupon, la bluzon. . .

- "Nu, rakontu, Doti, se tio malŝarĝos al vi la koron.

- Nu, komencis F-ino Sengarna vi scias, ja, ke ĉi-semajne mi loĝas ĉe bakista familio, du stratojn for.

-Mi kredis min feliĉa, ke mi trovis tian komfortan lokon.

-Vi memoras la urbaĉon, kie ni ludis lastan semajnon.

-Nur kun peno mi trovis loĝejon, kiu fiodoris netolereble.

-Mi. . ."

F-ino Lipopar provis kelkajn danc-paŝojn, kaj la metalaj garnajoj de ŝiaj danc-ŝuoj klakis sur la nuda planko.

"Ne forgesu, ke oni vokos min post nelonge. Oni jam vokis la komencon de la uverturo.

- Nu konciziĝis F-ino Sengarna la bakista familio estas tri: patro bakisto, panjo kaj filo. La filo havas dek ses jarojn. Liaj okuloj per si mem naŭzas; porkaj, avidaj okuletoj kaj aknoj! Hu! Oni ne povus meti groŝon sur lian vizaĝon sen kovri aknon. Malĉastaj pensoj tiel svarmas en lia stulta kapo, ke ili pustuliĝas sur lia vizaĝo. Nu, mia ĉambro estas sufiĉe komforta trueto, du etaĝojn super la strato. Amiketo bakist-filo havas la alian ĉambron sur la sama etaĝo. Mi rimarkis, sed ne multe atentis la fakton, ke parto de la muro inter la du ĉambroj estas simpla ligna vando el tabuloj.

- Hodiaŭ la bakista familio kaj mi manĝis en hejmeca rondo malantaŭ la pan-butiko. Tuj poste mi devis jam forrapidi ĉi tien sed kiam mi min levis de la tablo, mia kruro ektuŝis ion malglatan kaj ziti!, tuj fulmis maltrikaĵo en mia bona nilona ŝtrumpo.

F-ino Lipopar murmuris kondolence.

- Nu ja filozofis F-ino Sengarna tiaj malfeliĉoj nin trafas ĉiujn. Sed nepre necesis, ke mi tuj ŝanĝu la ŝtrumpojn kaj forkuru al la teatro. Do mi pelis min supren al mia ĉambro, kaj elserĉis alian paron. Dum mi serĉis, mi aŭdis fileton-bakiston veni supren kaj iri en la propran ĉambron. Nu: tion li ja rajtis en la propra hejmo. Sed kiam mi sidiĝis por ŝanĝi la ŝtrumpojn, trafis min stranga maltrankvilo. Mi ne aŭdis la bakist-filon moviĝi en sia ĉambro, eĉ tra la maldika vando. Mi rigardis la vandon kaj rimarkis ion, kion mi ĝis tiam ne rimarkis. Mi proksimiĝis kaj jes! Ĝi estis truo! Tiu feĉa, fetora fibubo boris truon por min observi en mia dormĉambro! Jes, kaj eĉ tiam li min observis.

Kiam mi proksimiĝis, mi aŭdis lin fortiri sin kaj karamboli kun io. Efektive, bruis, kvazaŭ li paŝus en nokto-vazon. Sed jes, mi esperas, ke ĝi estis plena.

- Kaj kion vi faris? Faris? Mi tuj ŝtopis la truon per korko el mia tus-medikamento.

Sed ĉu vi ne plendis? Al kiu plendi? Mi ŝanĝis la ŝtrumpojn kaj iris malsupren. Paĉjo kaj panjo

vendis panojn tre diligente en la butikoj, kaj cetere mi devis kuri ĉi tien plej rapide.

Fileto restis en sia ĉambro. Mi volis enkuri kaj mueli lian trudan nazaĉon sur la lit-kadro, sed se mi estus tion farinta, oni supozeble akuzus, ke mi provis atenci lian ĉaston. Fi, la kruda, kanajla kaĉuleto! Sed nur pensu, Zaza. Mi dormis tie jam kvar noktojn. De kiam li disponas pri tiu infera truo? Eble li eĉ kvarfoje vidis min pretigi min por la lito. Hu! kiel honte! La simpla penso naŭzas min. Tiuj porkaj okuletoj, tiu malseka buŝo hu!"

F-ino Sengarna skuiĝis de abomeno.

Ŝia kamaradino rigardis flanken kun stranga vizaĝmieno.

"- Sed Doti, mia kara. . ."

Bum-bum-bum! Vigla frapado ĉe la pordo ŝin interrompis. Monotona voĉo kriis: "F-lino Lip'ar! Nepra voko! Nepra voko! Venu tuj, m'petas". " Ĝis re, kara Doti! Ne tro ĉagreniĝu!"

Post la foriro de sia kamaradino F-ino Sengarna kompletigis sian pretigon. Ŝminkinte, en longa blua robo, ŝi staris antaŭ la spegulo kaj zorge sidigis sur sian kapon fantazie larĝan hispanan ĉapelon.

La sama kuriero revenis, frapis, kaj raŭkis alvokon.

F-ino Sengarna ĵetis lastan ekrigardon al la spegulo kaj sekvis lin. Ŝi spiralis ĉiam malsupren kaj ĉiam destren. Ŝiaj molaj pantofloj faris neniam bruon sur la ŝtupoj.

La vasta scenejo kuŝis en duona mallumo.

Granda tolo du metrojn post la portalo kuŝis la publikon. Tra ĝi la knara voĉo de komikisto estis aŭdebla, kaj foje-foje alruliĝis ridego el pli ol mil gorĝoj.

Sur la sceneja planko, dancistinoj staris pretaj en kostumo de hispanaj kavaliroj kaj sinjorinoj. Malantaŭ ili supreniris ŝtuparo-forma podio garnita per hispanecaj bagateloj. Jen kaj jen sur la ŝtupoj

jam staris belulinoj en hispana ŝalo kaj mantilo.

F-ino Sengarna ascendis preter ilin ĝis la plej supra plato de la podio. Tie ŝi staris. Eksonis la orkestro, la komikisto kantis strofon de kanzono, kaj sekvis tondra aplaŭdado. F-ino Sengarna forskuis siajn pantoflojn kaj kuŝis ilin sur oportuna breto malantaŭ la podio. Glitiginte la bluan robon for de siaj ŝultroj, ŝi faligis ĝin sur la saman kuŝitan breton.

La aplaŭdoj ĉesis. La scenejo tute mallumiĝis. F-ino Sengarna rigidiĝis en pozo. La tolo antaŭ ŝi facile leviĝis en la ombran hisejon. Hispanaj ritmoj ektamburiĝis el la orkestro.

Kaj venis la lumo. El supre, el flanko, el fokus-lanternoj en la aŭditorio, lumo, klara kaj mola, reliefigis la buntajn figurojn de la dancistinoj, kies piedoj jam vigle planko-frapadis, kies kastanjetoj jam klakadis. Ĝi falis sur la ŝtuparo-forman konstruon en la fono: sur la hispanajn ŝalojn de la senmovaj figuroj starantaj dise sur la ŝtupoj.

Ĝi falis karese sur la belan rozan figuron, kiu statuis plej supre sub la grandega ĉapelo. Pompis la rondaj mamoj, logis la glataj ŝultroj, la kava umbiliko, kaj la ĉarmaj konturoj de la longaj gamboj. Centoj da viraj okuloj boris el la mallumo: de mondaĝaj kazinuloj, de senspertaj knaboj, kiuj vidis nudulinon antaŭe nur en sekreta revo.

Tie supre, tra la menso de F-ino Sengarna kuris subita bildo de avida okulo malantaŭ truo en ligna vando. Ŝi sulketigis la frunton, kai iom de la sukero malaperis el ŝia rideto.

Verko premiita en la Belartaj Konkursoj Dua premio de prozo, 1954

Fonto <http://literaturo.esperanto.net/bk/verk/fraulinpudor.html>

Informoj de Julia el Frajburgo pri podkasto en Esperanto

En la retpaĝo <http://punkto.info> kuniĝas podkasto kaj aliaj retaj projektoj

Preskaŭ ĉiusemajne aperas nova epizodo de la podkasto kern.punkto pri io ajn en Esperanto, sed ne pri Esperanto. Jen la lastaj temoj:

• KP202 Metrooj - Rapida urba trafiko publika

Pliajn epizodojn vi povas trovi en la arkivo: <https://kern.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <https://kern.punkto.info/tuje/>

Neregule aperas la epizodoj de la podkasto movada-vid.punkto pri Esperanto-movadaj temoj. Jen la lastaj temoj:

• MvP024 Lingvolernado - Kiel instrui lingvojn al infanoj

Pliajn epizodojn vi povas trovi en la arkivo: <https://movada-vid.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <http://movada-vid.punkto.info/tuje/>

Ĝuu la aŭskultadon hejme aŭ survoje.

REMEMOROJ PRI KATALUNAJ FERIO-SEMAJNOJ

Rakontas Rosa Lopez okaze de

VIZITO AL MARIA FERIGLE DANTI

Maria Ferigle, kiel multaj esperantistoj scias, estas la vidvino de Luis Serrano, kiu organizis la Internacian Semajnon de la Kulturo kaj Turismo dum 22 jaroj kaj Maria gaje apogis lin.

La 11an de aprilo mi vizitis ŝin, ni ne vidis unu la alian ekde kelkaj jaroj, ŝi jaraĝas 91, al ŝi mankas movebleco kaj ŝi ne foriras eksteren sed ŝi estas tre lucida kaj havas bonan memoron.

Ni parolis pri Esperanto, la pandemio, la milito ktp.

Ankaŭ ni parolis pri la morto, ni ambaŭ konsentis, ke la korpo diserigās sed la animo aŭ energio daŭriĝos. Mi diris al ŝi: Imagu esperantista festo en la estonteco, kie ni renkontos denove milojn da bonajn esperantajn geamikojn, inter ili Luis. Ni multe amuziĝis. Maria estas feliĉa virino.

Parolante pri la kutimaj ŝanĝoj dum la jaroj, ŝi diris ke dum ŝia juneco estis permesita preskaŭ nenio, nuntempe la junuloj estas tre liberaj, ŝi volus naskiĝi nuntempe. Ni ridis.

Ŝi petis al mi viziti ŝin denove kaj mi volonte vizitos ŝin meze de junio, post la 39a kataluna kongreso en Castelldefells por rakonti al ŝi la eventon.

Rosa Lopez



1- La franca Esperanto-Kulturdomo en Gresillon gastigos ĉi-somere ukrainan patrinon kun ŝiaj infanoj, kiuj fuĝis de la milito. Vi povas renkonti ilin aliĝante al nia aŭgusta staĝo. Sed vi povas ankaŭ fari donacon por helpi al Greziljono gastigi esperantistajn rifuĝintojn el Ukrainio

Se vi konas ukrainajn esperantistojn, kiuj povus veni ĉi-somere al Greziljono, bonvolu sciigi tion al ni

2- Sciu ke :
11.-21. julio 2022: 6-a **Maratona Esperanto-kurso** kun *Pawe³ Fischer-Kotowski, Alex Humet, Andrea Bertrand*, ILEI-ekzameno. **Prelegoj** pri diversaj temoj. Aliĝintoj el 8 diversaj landoj. Vidu gresillon.org/s3

16.-25. aŭgusto 2022: 12-a **Festa Semajno por infanoj kaj familioj** kun *Jean-Luc Kristos, Nicky Janssen, Larisa Osaĝuk, Svitlana Kozarenko*. Koncerto de *Fundu*. Vidu gresillon.org/s4

11 - 21 juillet 2022 -- 6e **Cours d'espéranto** marathon avec Pawe³ Fischer-Kotowski, Alex Humet, Andrea Bertrand

11 - 21 juillet 2022 -- 33e Conférence Internationale d'Espéranto sur des thèmes divers, examen ILEI -- gresillon.org/s3fr

16 - 25 août 2022 -- 12e Semaine festive pour enfants et familles avec Jean-Luc, Nicky, Larisa, Bert -- gresillon.org/s4fr

En été, voir aussi :

2 - 3 juillet 2022 -- 2e Festival NATURist' (avec cours d'espéranto) organisé par FestiNATUR'

4 - 8 juillet 2022 -- 3e Semaine Verte de **Naturisme** avec INOE -- gresillon.org/s1fr

25 juillet - 4 août 2022 -- 8e Échanges de savoirs et de savoir-faire (en français) -- gresillon.org/s2fr

Et 2 mois après, voir l'agenda gresillon.org/agenda

12 - 16 octobre 2022 -- Stage de LandArt avec Nathalie Rigault

14 - 16 octobre 2022 -- Stage de danses bulgares, roumaines, hongroises avec Célia Kameneff, Philippe Colleu

17 - 24 octobre 2022 -- Semaine BEMI de cyclistes espérantophones avec Olivier Buisson

18 - 23 octobre 2022 -- Rencontre chorale d'Interkant avec Zdravka Bojĉeva

24 oct - 3 nov 2022 -- 11e AŬTUNE, les vacances espéranto avec Anna Löwenstein

BONVENON EN VIA ESPERANTO-KASTELO!

NB: S'inscrire 1-2 mois en avance pour profiter une réduction.

Ni lernu per enigmo kaj humuraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										
11										

G.J.

Tiu knabineto rehejmiĝas tute ekscitita. . .
"Panjo, panjo. . . Fredo deponis kiseton sur mian buŝon dum la Iudo-paŭzo!"
 Tute ŝokita la patrino reagas:
"Nekredeble, ĉu vere tio povas okazi?"
-Tamen, ne tiom facilas la afero. . . Feliĉe helpis min du amikinoj por kapti lin, ĉar li ne volis!"

En kafejo, iu kiento kliniĝanta antaŭ sia bierglaso tute triste mienas. La scivola kelnero alproksimiĝas:
"Ĉu io malagrabla, aŭ eĉ doloriga okazis al vi?"
Ĉu mi povas helpi?"
- Ne, ne sed jam de kelke da tempo mi ne plu havas amikojn... Kelkaj foriris, aliaj forpasis..
Mi kompatas min, tre verŝajne vi ilin ŝatis.
-Jes, ĉefe Mikaelo mankas al mi.
Mi edziĝis al lia edzino!"

MAGIA PUTO

Eta Alano kaj Avo Roberto promenas.
 Alano vidas afiŝon, "Magia puto":
"Kio estas "magia puto", avĉjo?"
 Avo Roberto: *"Tio estas puto, kiu realigos iun vian deziron, se vi unue enĵetos moneron."*
 Alano: *"Ĉu tio vere funkcias?"*
 Avo Roberto: *"Vidu mem. Jen dudek cendoj. Ĵetu la moneron en la puton, kaj deziru ion."*
 Alano proksimiĝas al la puto, kaj staras antaŭ ĝi dum kelkaj sekundoj antaŭ ol reveni al sia avo.
 Avo Roberto: *"Sed Alano, mi ja vidis, ke vi ne ĵetis la moneron en la puton!"*
 Alano: *"Vi pravas, avĉjo. Mia deziro estis konservi la moneron kaj mia deziro realiĝis!"*

HORIZONTALA

1. Malrapidec' de la kora pulsado.
2. Inflamo de la okulo.
3. Malfermaj'. Litera nomo.
4. Subtera ĉambr'. Araba nom' de la malsupra Mezopotamio.
5. Nombro montranta la koncentritecon de solvaĵo. Son' konfuza.
6. Orgojlo. Konjunkcio esprimanta diferencon.
7. Amaso da multvaloraj objektoj.
8. Nomo de la dua tono de la gamo. Malbravul'.
9. Rekta. INVERSE: granda argila vaso.
10. Korneca elkreskaĵo ĉe la ekstremo de fingroj. Komencu!
11. Memvetura fervoja veturilo.

VERTIKALE

1. Supra membr'. Senaktiveco.
2. Privata instruist'.
3. Ĉambr', kie labora pentristo. Ar', kiun oni rigardas kiel unu aferon, ne konsiderante partojn.
4. Parol'. Drilego.
5. Parto de la plusvaloro. Regnokodo de Grekio.
6. Rilativo. INV: altirforto de io. Zigot'.
7. Interna kort' kun portiko. Angulo de 90°.
8. Kapo de roboto. Koro de arbo. INV: gramatika kategorio.
9. Emblem' de ludkartoj. INV: argileca mineralo.
10. Ag' de iu, kiu enkondukas mikrobon en vivulon. Interjekcio uzata por atentigo.

ĈU VI ŜATAS FAZEOLJOJN?

Jozefino kuiris fazeolojn kaj surtabligas ilin.
 Stefano ribelas: *"Jonjo! Mi ne volas fazeolojn!"*
 Jozefino: *"Kio okazis!? Lunde vi ŝatis fazeolojn. Marde vi ŝatis fazeolojn. Merkrede vi ŝatis fazeolojn. Kaj ĉu nun vi subite ne plu ŝatas fazeolojn!?"*

MALĜUSTA TAGO

Petro alvenas hejmen post longa, laciga tago.
 Li malfermas la pordon kaj salutas: *"Saluton! Jen mi!"*
 Li daŭrigas: *"Kiom misa tago! Ĉi-matene mi prenis la malĝustan buson; en la laborejo mi verkis la malĝustan raporton; mi manĝis la malĝustan tagmanĝon; kaj fine mi iris al la malĝusta kunsido! Mi estas kontenta ke mi fine atingis la hejmon!"*
 Subite, nekonata virino aperas: *"Vi estas en la malĝusta domo!"*

SOLVO de KVE 197:

Horizontale:

- 1.KOMPLIMENT 2.OVARI. ELIR. 3.NEGATIVE
- 4.GLUTAMAT 5.ROSE. IS. JA 6.KRISTIAN 7. GARIG. ARM. 8.ARIT. AZTEK. 9.CAP. KLOAKO. 10.IRTNEP. NSL.

Vertikale:

- 1.KONGREGACI. 2.OV. LO. ARAR. 3. MANUSKRIT. 4.PRETERIT. 5.LIGA. IG. KE. 6. AMIS. ALP. 7.METASTAZO. 8.ELIT. IRTAN. 9. NIV. JAMEKS. 10.TREPAN. KOL.

Antaŭ iom da jaroj, en 2017, okazis en Colmar tre interesa kongreso de IFEF (Fervojistoj) Tiam, mi havis la grandan plezuron kaj honoron paroli al la kongresanoj pri la stacidomo de Colmar. Ĝiaj tegmentoj respegulas la historion de la urbo, ĉar ĝi estis konstruita dum la germana periodo (1871 /1918) Se iu observas atente, la teknikaj metodoj por almeti ardezo-platojn sur la tegmenton estas malsimilaj: Dekstre de la enirejo, ili aspektas kiel bela ilustraĵo de franca metodo, devenanta de l'urbo ANGERS. [Anĵe] Kaj maldekstre, ili elvokas la ĝermanan teknikon, tre malsimilan. Interese, sed malmultaj levas sian rigardon por rimarki tiajn diferencojn!

Ĉu vi estas bona observanto? Jen enigmo de Pierre



Bildoj 1 & 2: malsamaj metodoj sur la tegmento de la stacidomo de Colmar: maldekstre ĝermana metodo. Dekstre franca metodo.

Belaj konus-formaj tegmentoj.

Sur multaj monumentoj videblas turoj, kies tegmento estas *konus-forma*. Tiajn oni nomas en la franca "*tourelles*". Plej ofte ili estas kovritaj per ardezo, sed foje ankaŭ per plataj tegoloj, precipe en sudaj regionoj: lom da logiko: sur la baza vico estas eble 200 aŭ pli da ardezoj. Sed proksime de la firsto (supre), ĉu povas esti la sama nombro da ardezoj? Se jes, la ardezoj estas tie-supre ege mallarĝaj! Evidente, ekzistas metodo por redukti la nombron de ardezoj de malsupre supren!

Kiel diris komika artisto: **Oni kaŝas ion al ni!** Sur kelkaj konusaj tegmentoj, estas facile rimarki, ke la tegmentistoj faris ornaman zonan, foje okulfrapan. Anstataŭ montri rektangulajn tradiciajn formojn, la ardezoj sur tiuj zonoj estas triangul-formaj aŭ aspektas kiel fiŝ-skvamoj.



Bildoj 3, 4, 5: Diversaj konusaj tegmentoj montras siajn robojn sub la suno.




Bildo 6: Maldekstre sur privata domo, lignaj skulptitaj pecoj sub la defluilo (ĉe la bazo). Sur la konuso, notindas DU ornamaj zonoj.

Se vi estas bona observanto, vi povas rimarki, ke la fiŝ-skvamaj ardezoj estas pli larĝaj ol la supraj, pinto-formaj. Tute normale! Sed tiu konuso ne estas granda. Ŝajnas, ke tie la du zonoj havas nur ornaman celon. La nombro de ardezoj estas la sama de malsupre ĝis-supre.




Bildo 7: Dekstre: Konusa tegmento kovrita per ardezoj apud Angers: Tutcerte, estas malpli da ardezoj apud la firsto (ĉe la pinto, supre) ol ĉe la bazo. Kiel atingi tiun rezulton?

La tegmentistoj inventis antaŭ-longe la metodon de **salto**: lom post-iome la diametro de la cirklo fariĝas malpli larĝa. Necesas almeti malpli da ardezoj!

Por havi malpli da ardezoj post kelkaj horizontalaj vicoj, ili kovras du ardezojn per unu (*salto* de 2 al 1) aŭ tri ardezojn per du (*salto* de 3 al 2)




Bildoj 8 & 9:
 Maldekstre, **salto de 2 al 1:** Du pli larĝaj ardezoj kovras kvar mallarĝajn!
 Dekstre, **salto de 3 al 2:** Du pli larĝaj ardezoj kovras tri mallarĝajn.
 Per tiu metodo, oni facile kaŝas la salton, kiu fariĝas nevidebla, kiel sur foto 7. Sed foje la tegmentisto deziras montri sian arton kaj substrekas la salton per ornamita zono de diversformaj ardezoj.



Bildoj10:maldekstre, kaŝita vico B por eviti likojn

Bildoj11: Dekstre: A mallarĝaj ardezoj. B kaŝita vico. C Nova vico de pli larĝaj ardezoj.

Bone observu tiujn bildojn: Maldekstre, 1 ardezo kovras po 2 (salto de 2 al 1) Sed estas risko de liko pro pluv-akvo, kiu povas enflui en la subtegmenton tra la vertikalaj juntoj inter ardezoj de vico A kaj tiuj de vico B. Same, dekstre videblas risko de liko, Vidu la juntojn, sur sama linio ĉe ardezoj 2 kaj 3. Por eviti likojn, la tegmentisto aldonas kaŝitan vicon sub la unua vico de pli larĝaj ardezoj. Oni povas fiksi tiun kaŝitan vicon nur per najloj. Kial ne montri ili, surmetante sur ĝin novan vicon da ornamaj ardezoj (rondaj, pintaj, ktp) ? Tiel naskiĝis la ideo de ornamita zono.



Bildo 12:Por kaŝi la salton, ornama zono per 4 vicoj de pinto-formaj ardezoj.

La demando de Pierre:

Kaj nun, kara leganto, iom da observado! Vi bone vidas, ke sur tiu konuso aperas ornama zono.

Por pli bone vidi, rigardu la pligrandigitan foton sube:

Demando: Ĉu tiu zono estis muntita NUR pro ornama celo (sen salto) ? (Respondo A)

Aŭ, ĉu ĝi kaŝas salton? Kaj se jes kian? ĉu 2 al 1 ĉu 3 al 2? (Respondo B).

Ni gratulas vin, se vi atente legis tiun teknikan priskribon. Kaj ni sen-pacience atendas vian respondon. Sendu ĝin al verdapigo@gmail.com aŭ per SMS al 06 20 46 45 22 Pierre Grollemund



Bildo 13: Bela konuso supre de helica ŝtuparo sur privata domo en Saint-Rambert [sankta Ramberto] Francio.



Staĝo en Métabief de 20a ĝis 27a de aŭgusto 2022

Gastejo

“Les Sapins de l'Amitié” (La Abioj de l'Amikeco) estas ĉaledo, kiu kapablas akcepti 80 homojn (grupojn, familiojn...) tutjare. Ĝi situas en la centro de Métabief, mez-montara skiejo, apud la svisa limo.

La gastiga skipo akceptos vin kaj zorgos pri via restado en 2 ĝis 12-litaj dormo-ĉambroj ĉe la 1a aŭ la 2a etaĝo. Estas ankaŭ granda teraso kaj ĝardeno (4000 m²)



Nia kuiristo kuiras bonkvalitajn manĝojn kaj proponas adaptitajn manĝojn laŭeble.

Purigado de la manĝilaro estas mane farita de la feriantoj mem (amika kaj muzika etoso!).

Same ni bezonos vin por pretigi kaj malpretigi tablojn.


Eblos resti nur kelkajn tagojn.

Personoj, kiuj deziras pli da komforto, rezervos hotelon aŭ alian gastejon. Ili povas nur tagmanĝi kaj vespermanĝi kun la aliaj partoprenantoj en la ĉaledo.

Kiel atingi la ĉaledon?

Per veturilo: Proksime de Pontarlier

Per trajno: TGV Paris Lausanne, haltejo Frasné, poste de la stacidomo de Frasné, buso ĝis Métabief, 200m de la ĉaledo.



Agad-eblecoj (decidu je la komenco de la restado)

- Malkovro de la regiono: piede, aŭte. . . ĝia faŭno kaj flaŭro.
- Akvaj ebloj ĉe la lago de Malbuisson: naĝado, pedalboato, ...
- Vizitoj: Fromaĝejo, Château de Joux (kastelo), Natur-rezerveja domo de la lago de Remoray, Montara muzeo en La Chapelle des Bois, fonto kaj akvofalo de la rivero Doubs, Grotoj de Vallorbe, ktp.

La kursoj de Esperanto

Tri kursoj estos proponataj.

Kursoj de 9a30 ĝis 12a (kun paŭzo je 10a30) kaj de 17a ĝis 18a30 (laŭ aktivaĵoj dum la posttagmezo).

Duontagaj migradoj por malkovri naturon esperantlingve, vizitoj, aŭ aliaj agadoj

Esperanto en Chalonnois
siège social: Mairie de Fragnes la Loyère 71 530

Kontakto: Anne-Marie Ferrier +336 78 45 60
annemarieferrier@orange.fr
aŭ stagemetabief@orange.fr

Bulletin d'inscription / Aliĝilo Métabief de la 20a ĝis la 22a de aŭgusto 2021

à renvoyer à / Bonvolu ĝin sendi al Anne-Marie FERRIER 20 rue de la Chesnaie
FR-71530 FRAGNES - LA LOYERE Tél: 336 78 45 60 49
ou/ aŭ al Vincent GERBE 33 Avenue des Marronniers FR 69270 FONTAINES-SUR-SAONE
Courriel: stagemetabief@orange.fr

<p><i>Pour inscrire une famille, inscrivez chaque personne séparément. Por familio, ĉiu persono sendu apartan aliĝilon</i></p> <p>Nom (familia nomo) : Prénom (persona nomo) : Adresse (adreso) :..... Pays (lando) :..... Téléphone (telefono) :kun landokodo: Adresse courriel (ret-adreso) :</p>	<p>Hébergement du 20 au 27 août 2022 Restado-kosto de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto 2021 340 € 7 nuits et repas par personne/ 7 tranoktoj kaj manĝoj por unu persono</p> <p>Pour les personnes ne logeant pas au chalet 2 repas/jour par personne Por la personoj sen tranoktado sed nur manĝoj (2 manĝoj tage por unu persono) 240 €. <i>2 repas par jour/ personne (2 manĝoj tage / unu persono)</i> 40 €/</p> <p>Participation au stage d'Espéranto Partopreno al la staĝo de Esperanto 60 €</p> <p>Séjour de qq jours seulement restado dum nur kelkaj tagoj (potage) 50 €/ Précisez les dates/ Indiku la tagojn</p> <p>Total / Sumo _____</p>
---	---

Courriel: stagemetabief@orange.fr

L'hébergement comprend: la nuit, le petit déjeuner et 2 repas avec boissons.

La restado-kosto entenas: tranoktadojn, matenmanĝojn kaj 2 manĝojn tage kun trinkaĵoj.

Pratique alimentaire/ Manĝo-preferoj

Je mange de tout Végétarien Végétalien Sans porc
Mi manĝas ĉion proponitan Vegetarano Vegano Sen porkaĵo

Pour les cours d'Espéranto, notez le cours suivi / elektita Esperanto-kurso

Débutant Perfectionnement Conversation
Komencanto Perfektiĝo Konversacio

Je paie 100€ à l'inscription et le reste pendant le séjour

Mi antaŭpagas 100 eŭrojn aliĝante kaj la ceteron surloke, dum la staĝo.

Par chèque à l'ordre de "ESPERANTO EN CHALONNAIS"

Par IBAN per bankĝiro

CME CHALON SUR SAONE

Intitulé du Compte / al la konto:

ESPERANTO-EN-CHALONNAIS

IBAN: FR7610278025740002039720135

Code BIC (Bank Identification Code) -

Code **swift**: CMCIFR2A

ĝiro-celo: notu / Comme motif du virement notez:

stage du 20 au 27 août 2022 et votre nom, kaj vian nomon



Lieu / Loko..... **Date / Dato**.....

Signature / subskribo

Fabelo: La Ansero de Ebnat

Antaŭ longa tempo, je la loko, kie nun estis konstruita la monaĥejo en Neresheim, staras viktim-ŝtono. La farmistoj ofte venas tien, por plendi pro la vetero, kelkfoje estis tro seka ali-tempe tro malseka.

Ĉar la farmisto mem ne povas influ, kia estu la vetero, kaj la vetero-Dio ĉiam sendis la veteron ne laŭ iliaj ĝustaj bezonoj, ili kunportas donacojn por mildigi la vetero-Dion.

Kiam denove estas tro malbona tago, la tuta enloĝantoj de Ebnat, pilgrimis al tiu loko, por peti tiun dion por pli taŭga vetero. Je la kaverno de la vetero-Dio ili kantis kaj preĝis. Kaj por mildigi la vetero-dion ili kunportis du ornamitajn anserojn al la malluma kaverno, por kvitegi la vetero-Dion.

Samtempe du senhejmuloj estis en Neresheim kaj pro la malbona vetero restis en la kaverno ĉe la ŝton-muelejo. Kaj dum-tage la suno ne estis videbla, kaj la senhejmuloj estis ege malsataj.

Ambaŭ cerbumis, kiel ricevi ion por manĝi, kiam ili aŭdis anser-blekadon, kaj kiam ili rigardis la ornamitajn anserojn, ili simple ĝojis kaj ne demandis pri kialo.

Iom da tempo poste la senhejmuloj estis en la ĉirkaŭaĵo de la komunumo Ebnat, kaj homoj rakontis al ili, ke por mildigi la vetero-Dion, ili sendu anserojn en la kaverton.

Ili ne estis stultaj, ili rimarkis, ke la kaverno de Ebnat kaj Neresheim estas kunigitaj per tunelo.



Skulptaĵo 11-la ansero de Ebnat

Ili estis tre ruzaj, kiam ili malsatis, kaj ili timegis la farmistojn, rakontante pri la kolerego de la vetero-Dio kaj ili tiom aktoris, ke post mallonga tempo alvenis du ornamitaj anseroj al Neresheim.

Fabelo: La mirinda primolo

Jen printempa aŭ paska fabelo de mirinda primolo. En la fabeloj (historietoj) de Eŭropo estas ofte uzata motivo "esti atentema pri la donacoj de la tero"- bonvena mesaĝo al Pasko: https://www.youtube.com/watch?v=hwK_BebVqtA

La motivo de mirindaj primoloj ofte aperis en fabelaj historioj de Eŭropo. "Estu atentema pri la aĵoj (donacoj) de la tero "tiu ankaŭ estas mesaĝo de Pasko.

La primola feino

Dum la tempo, kiam en la mondo ekzistis feinoj, la floro Primolo havis miraklajn povojn.

Kiu je la ĝusta momento plukis tiujn florojn, tiu havas feliĉon.

Iam ŝafpaŝtisto dum la komenco de la printemo pelis siajn ŝafojn al la paŝtejo.

Kiam la ŝafaro komencis manĝi la herbon, li ekvidis apud roko flortajn primolojn. Li plukis la plej grandan kaj belegan floron kaj afiksis ĝin je sia ĉapo. Post iom da tempo la ĉapo ege peziĝis.



La paŝtisto forprenis la ĉapon kaj restis staranta kvazaŭ enradikiĝinta. Anstataŭ la floro nun troviĝis eta ora ŝlosilo je la ĉapo.

Li prenis la ŝlosilon per la mano, kaj tuj en tiu momento, ekaperis belega feino.



“Ne timu!” ŝi diris “la ŝlosilo estas via feliĉo!” “Metu ĝin sur tiun rokon!”

La roko estas kiel pordo kaj vi rigardos al ĉiu valorajo de la mondo. Prenu por vi tiom, kiom vi volas, sed atentu, ke vi ne forgesu la plej gravan.

La paŝtisto ne sciis, ĉu li sonĝis aŭ estis veka.

Li paŝis al la roko, metis sur ĝin la ŝlosilon, kaj tuj en tiu momento malfermiĝis pordego al subtera groto. Kaj ne-kredeble, li ekvidis en tiu groto amase oron, arĝenton kaj juvel-ŝtonojn, Tuj li enpakis en sian jakon multon de tiuj valorajoj kaj enpakis tiom multe kiom li povis porti. Kaj kun ĉio-ĉi li rapide forlasis la groton.

Sed la plej gravan, la oran ŝlosilon li ne kunportis. (li forgesis ĝin kunpreni)

Ek de tiam la primolo perdis la forton kiel ŝlosilo por malfermi la subteran valoraj-plenan groton (kaj ankaŭ la feino ek de tiam neniam montris sin al la homoj.)

Nia bulteno volas danki nian samideanon Dominique GANTER, pro sia apogo al nia lingvo pere de etiketoj de siaj varoj trilingve inkluzive “Esperanton”.

Esperanto-mielo en Colmar

Fakte li komencis fari mielon en 1980 kaj tiam estis membro de la Esperanto-Klubo de Colmar.



Foto! Bazar Saint-Joseph COLMAR sabate 18/12/2021 Jean, la posteulo kaj Dominique (Foto BM)

En sia farmbieno en Fréland “l’Abeille bleue” Dominique bredis 40 milionojn da abeloj en 400 abelujoj kaj produktis mem 40 tunojn da biologia mielo po jaro de diversaj specioj. (Floroj, Akacio, Tilio, Kaŝtanoj, Abioj kaj Montaraj floroj)

En ĉiuj produktoj de mielo kaj pomsuko, oni povis trovi vortojn en Esperanto, ekz: Akacio-mielo (Esperanto)

De Januaro Dominique emeritiĝis, ni deziras al li kaj lia familio feliĉan vivon.

<https://gitedelabeillebleue.fr/abeille-bleue/>



Nia foto-paĝo



Printempo en Slovakio

La printempo montras siajn buntajn kolorojn



En Murbach

